

Praktikismo kaj idealismo, debato en Helsinki
TEJO-kongreso
Claude Gacond, 317-a radioprelego, 1969.11.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni konstatis, ke en la Debato organizita en la Universala Kongreso en Helsinki la opinioj de la ĉeestantoj sufiĉe egale dividiĝis inter du tendencoj, kiujn ni difinis per la vortoj **praktikismo** kaj **idealismo**. Eble kelkaj geaŭdantoj havos pli bonan etiketon por difini tiujn tendencojn.

A.- Hodiaŭ ni iom raportos pri tiuj du tendencoj, kaj se geaŭdantoj skribas tiurilate sian opinion, ni legos tiujn leterojn en venonta prelego.

Cl.- Laŭ la resumo pri la Debato en Helsinki, kiu aperis en la UEA-organo *Esperanto*, ni trovas interesajn tekstojn, kiuj sufiĉe bone difinas la sintenon de la praktikemuloj :

A.- En tiu raporto ni legas pri la enkondukaj paroloj de sinjorino Emilija Lapenna kaj sinjoro E. Wensing :

Cl.- « ... *Ambaŭ parolantoj rekonis, ke por Zamenhof kaj por multaj pioniroj de Esperanto la lingvo estis instrumento por disvastigi la ideon de internacia amikeco, tutmonda frateco.* »

A.- Tiu raporto citas dirojn de sinjorino Emilija Lapenna :

Cl.- « ... *En la frua periodo de Esperanto la interna ideo estis la animforto ebliganta elteni la malfacilan situacion. En la nuna tempo Esperanto estas instrumento por la ideologio, kiun oni povas nomi Internaciismo. Nia idealo devus esti : eduki la infanojn jam de frua aĝo al internaciismo. Por tio la Internacia Lingvo estas la logika ilo.* »

A.- Siaflanke sinjoro Wensing argumentis tiel :

Cl.- « ... *La epoko funde ŝanĝiĝis, ni tro longe martelis sur la amboso de sloganaj kiel **paco per Esperanto**... La venonta periodo estu nepre periodo praktika, dum kiu ĉiu akcentos la praktikajn valorojn de Esperanto.* »

A.- Koncerne la dirojn de sinjorino Emilija Lapenna ni opinias, ke estus utile atente analizi, kion fakte kaŝas la ideologio **internaciismo**. Se la internaciismo estas la interbatalo de la naciismoj, kiel tio okazas en Unuiĝintaj Nacioj, kie la nacioj rifuzis forcedi parton de sia absoluta aŭtonomeco profite al monda registaro, ni dubas, ke esperanto estas la logika ilo por eduki la infanojn al tiu ideologio. Se sub la esprimo **internaciismo** sinjorino Emilija Lapenna vidas la marŝadon al vera **mondanismo**, jes, esperanto estas la logika ilo por eduki la infanojn. Esperanto konkretigas la unuecon de la homaro, de la mondo. Esperanto ne simbolas la dividojn inter la nacioj.

Cl.- De pluraj jaroj ni konstatas tendencon en la UEA-kongresoj por malpermesi la porpacajn manifestaciojn. La paroloj de sinjoro Wensing klare esprimas la opinion, ke la esperantistoj devas ĉesi ligi esperanton kun la porpaca luktado. « *Ni tro longe martelis sur la amboso de sloganaj kiel **paco per Esperanto*** ». Jen lia opinio.

A.- Se ni rigardas al alia kongreso, al tiu de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo okazinta en Tyresö, kie kunvenis 120 gejunuloj el 25 landoj, ni rimarkas, ke la porpaca laboro restas unu el la celoj de tiuj esperantistoj.

Cl.- Kiel pruvo ni citos kelkajn erojn el la inaŭgura parolado prononcita de Humphrey Tonkin, la nova prezidanto de TEJO.

A.- Li interalie diris :

Praktikismo kaj idealismo, debato en Helsinki

TEJO-kongreso

Claude Gacond, 317-a radioprelego, 1969.11.05 & 08

Cl.- ...« *En la lastaj jaroj la Esperanto-movado moviĝis for de la Interna Ideo, kiu liveris al la fruaj esperantistoj la forton daŭrigi la disvastigon de la Internacia Lingvo ofte kontraŭ tre malfavoraj cirkonstancoj. La Interna Ideo donis al ili kredon je monda frateco kaj internacia harmonio, kiu facile degeneriĝis al sentimentalismo kaj sektismo, sed kiu estis tre daŭrokapabla. Sed lastatempe ni fariĝis pli praktikaj. [...]*

A.- *Sed mia opinio, daŭrigis Humphrey Tonkin, alvenis la tempo denove ĵeti rigardon al la Interna Ideo. La horora kondiĉo de grandaj sekcioj de la mondo devus nepre konvinki nin, ke oni ne povas dividi moralajn disde praktikajn konsiderojn, ke la du estas ĉiam interrilataj. Kiam nacio ignoras moralecon je la nomo de politika progreso, la rezulto estas finfine memdetrua, kaj ĉiam kondukas nur al pli granda nemoraleco. Kaj nemoraleco estas propradifine tiraneco. Tion krias la tutmonda junularo hodiaŭ al tiuj, kiuj pretas aŭskulti, sed la aŭskultantoj malmultas. »*

Cl.- Humphrey Tonkin ankoraŭ diris : « *La problemoj de tutmonda paco, de la legitimeco de la milito, de la moraleco de vastaj elspezoj je defendado kaj armiloj, estas demandoj, kiujn ni ne preterpaŝu aŭ evitu diskuti. Nia lingvo servas la homaron en paco, ne la homaron en milito. Sekve ni havas devon krei la kondiĉojn, en kiuj nia lingvo prosperos.*

A.- *Mi ne proponas reiron al la malaktualiĝinta idealismo de la frua Esperanto-movado. Mi tamen ja proponas, ke ni agnosku niajn sentojn pri tiuj ĉefaj demandoj de nia epoko, kaj ke ni utiligu Esperanton kiel ilon por esprimi tiujn sentojn. Ni posedas metodon de komunikado ŝlosita al la plejparto de la homoj : ni povas en niaj kongresoj renkonti homojn el ĉiuj mondopartoj vizaĝalvizaĝe, ne kiel delegitojn de la respektivaj landoj, sed kiel homojn al kiuj ni povas paroli rekte kaj sen malhelpoj. Ni uzu plene tiun unikan kapablon... »*

Cl.- Humphrey Tonkin ankoraŭ diris : « *Karakterizis la Esperanto-movadon en la lastaj jaroj certa timemo. [...] En niaj klopodoj eviti la antagonismon ni perdis la galvanismon. Kiel oni povas senti profundan lojalecon al dek ses reguloj kaj dudeko da akcentoj sur la antaŭlasta silabo ? Kiel la nacioj de la mondo povas entuziasmiĝi pri kelkaj participoj ? Dank'al Dio, ili ne povas. [...] Anstataŭ treti delikate por eviti ies ofendiĝon, ni igu niajn organizojn dinamisme kunligitaj fortoj por paco kaj justeco kaj la junulara idealo. La naciaj sekcioj de TEJO sin esprimu por la monda paco, aŭ socia justeco, kaj ili eĥu kaj gvidu la aspirojn de sia nacia junularo, anstataŭ fariĝi administraj nuloj sen potenco, sen celoj, kaj sen membroj... »*

A.- Unuavide oni povus opinii, ke inter la frazo de sinjoro Wensing « *Ni tro longe martelis sur la amboso de sloganoj kiel **paco per Esperanto*** » kaj la diroj de Humphrey Tonkin, la prezidanto de TEJO, troviĝas alfrontado de du kontraŭaj vidpunktoj.

Cl.- Sed fakte sinjoro Wensing verŝajne ne opozicias al la uzo de esperanto por pacaj celoj. Li ĉefe kritikis tiun tro ĝeneralan sintenon de la esperantistoj, kiujn kontentigas la sloganoj, kaj kiuj ne ekagas. Povu la junularo sub la gvidado de Humphrey Tonkin ne kontentiĝi je vortoj. Povu la diroj « *Ni devas krei la kondiĉojn en kiuj nia lingvo prosperos* » transformiĝi en veraj agadoj.

A.- La junularo, tiun ĉi jaron komencis ekagi : en Stockholm kaj en Tokio ĝi faris demonstracion kun sloganoj : la TEJO-anoj pri la kosto de la multlingveco, la japanoj pri la mondpaco per esperanto. Kiel sinjoro Wensing diris, ni esperas, ke tiu junularo ne kontentiĝos slogani, ke ĝi ankaŭ aktivos.

Cl.- Por multaj esperantistoj la internacia lingvo estas ilo por labori al la konkero de la paco. Aliaj esperantistoj volas vidi en sia lingvo nuran celon. Ili ekrezignis al la idealismo profite al praktikaj agadoj. Ne devus ekzisti kontraŭeco inter tiuj du pozicioj.

Praktikismo kaj idealismo, debato en Helsinki
TEJO-kongreso
Claude Gacond, 317-a radioprelego, 1969.11.05 & 08

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-